
# *Esperantologia konferenco atendas vin en Torino*

*Image not found or type unknown*



**Fonto: Revuo Esperanto**

Esperantologia Konferenco en preparo por Torino. Kiel sciate, la ?i-jara UK okazos en la bela Torino, en Italio ?i-somere.

Tial, la organizantoj alvokas ?iujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la 45-a Esperantologia Konferenco  sub la a?spicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

La aran?o estos hibrida, ebligante partoprenon rete kaj ?eeste, kadre de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio.

Du tri-horaj sesioj enhavos plurajn dudek-minutajn refera?ojn, elektitajn el inter la ricevitaj proponoj, kun fina ronda tablo pri la nunaj esploraj defioj de Esperantologio rilate al fontoj kaj arkivoj.

Oni bonvenigas proponojn de Esperanto-rilataj studobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, antropologio kaj literaturaj studoj; anka? interfakaj proponoj bonvenas.

Aparte bonvenaj estos proponoj kiuj analizas aspektojn de Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko en Italio, honore al la lando kiu gastigas la ?i-jaran kongreson.

Surbaze de la prezentoj, kelkaj elektitaj tekstoj, redaktitaj de la a?toroj por publikigo, aperos en la revuo Esperantologio / Esperanto Studies.

Oni invitas ?iujn fakulojn - aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn - sendi proponojn pri refera?oj. La limdato por proponoj estas la 15-a de majo 2023.

Esperantologia konferenco atendas vin en Torino!

Fonto: uea.org

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/321016-esperantologia-konferenco-atendas-vin-en-torino](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/321016-esperantologia-konferenco-atendas-vin-en-torino)

**Radio Habana Cuba**